**ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2024-01-15 ĝis 2024-04-15.

***Ŝlocilpunktoj: nova etapo de kunlaboro por "Landa Agado" (LAPA); ILEI-kongreso-2024 kaj aliaj; ILEI-forumoj; instruistaj trejnadoj: intaj kaj ontaj; novaj kursoj de Esperanto; eventoj enkadre de la Jaro de Interkultura Kompetento-2024; nova konkurso enkadre de la projekto "Premio La Torre"; universitata agado; omaĝe al 75-jariĝo de ILEI; IPR kaj JA; sciencaj esploroj pere de Esperanto kaj por ĝi; novaj publikaĵoj.***

**Eventoj**

Ekde aprilo 2024 ILEI iĝis la ĉefa patrono de "Landa Agado" – la laŭlanda, laŭkontinenta raporto pri la stato de diversaj Esperanto-asocioj kaj la landoj, eldonita de Stefan MacGill. LAPA ampleksas sep mondajn regionojn.

**La Estraro**

Estis komencita la preparado de elekto de la venonta Estraro de ILEI. Ekde 2024 la reprezentanto de ILEI en Fondaĵo Ludoviko Zamenhof iĝis Laura Brazzabeni.

**ILEI-Kongreso 2024**

LKK trovis senpagan kongresejon kaj preparis novan informilon kaj dissendis. Nun LKK esploros pri invitleteroj por Brazilo. Aliĝilo jam estas ĉe: 2024.kongreso.org. La 17-an de marto la Prezidanto de LKK s-ro Aristophio Alves Filho prelegis pri la 57-a ILEI kongreso en Brazilo dum la Dimanĉa Kunveno pri komerco kaj ekonomio de IKEF. Jen estas la filmeto, kiu prezentas la ejon kaj la kongreson: https://youtu.be/tdMIUySeqHI?si=DjMOazu35Kz8MQb8

**Simpozio**

La simpozia temo: "Lingvoj de instruado kaj justa edukado". Respondecas la estrarano Fernando Pita. ***ILEI bonvenigas ĉiujn fakulojn kontribui al la simpozio!***

**ILEI-kongreso 2023**

Laŭ la malnetaj kalkuloj de la kasisto Karine Arakelyan la kongreso-2023 estas profita.

**Postaj Kongresoj**

Ĉe la paĝaro de ILEI aperis alvokoj por kandidatiĝo al la kongresoj 2025 kaj 2026: https://www.ilei.info/novajxoj/alvoko_por_2025-2026.php

Konforme al la Kongresa regularo de ILEI (https://www.ilei.info/dok/Kongresa_regularo.pdf), la Estraro de ILEI invitas landajn sekciojn de ILEI, aŭ aliajn Esperanto-organizojn kunlabore kun la ILEI-sekcio, aŭ memstare se en la lando ne ekzistas sekcio de ILEI, kandidatiĝi por invitanto de la 58-a Kongreso de ILEI planata por la jaro 2025; kaj invitanto de la 59-a Kongreso de ILEI planata por la jaro 2026. Pli detale legu ĉe: https://www.ilei.info/novajxoj/alvoko_por_2025-2026.php

## ILEI-forumoj

Daŭras forumoj por instruistoj "Lerneja Esperanto-agado". Vica reta kunveno okazis la 23-an de januaro 2024, kie Koffi GBEGLO prezentis Esperanto-agadon en Instituto Zamenhof, Lomeo, Togolando. Survojas la preparado de la vica kunveno. La sekva kunveno estas planata pri diversaj lernrimedoj.

## Kapabligo

ILEI subvencias per 1.000 eŭroj la Seminarion de Serba Esperanto-Ligo (SEL) por instruista trejnado kaj aktivula lertigo okazonta inter la 17a kaj 24a de aŭgusto 2024 en Beogrado, enkadre de Erasmus-projekto de SEL. Pere de la sama projekto du instruantinoj de Esperanto el Serbio trejniĝas en Poznano, du membrinoj de ILEI-RS partoprenis la seminarion dum ILEI/kongreso 2023, kaj unu membro partoprenis la Hispanan Kongreson de Esperanto en Sevilla kaj tiuokazan universitatan seminarion pri Esperanto, homa konduto, sociaj retoj kaj artefarita intelekto.
La aŭgusta seminario en Beogrado okazos kiel parto de ampleksa evento organizata kunlabore kun LIBE kaj sub respondeco de Radojica Petroviĉ kaj Aranka Laslo. Prelegos Duncan Charters, Francesco Maurelli, Sara Spano kaj aliaj fakuloj. Pliaj informoj legeblas ĉi tie kaj ĉe https://eventaservo.org/. Pli detala prezento aperos en IPR 2024/2. UEA subvencias la seminarion per 4.975 EUR. Stipendion ricevos 12 seminarianoj elektotaj per la Stipendikonkurso, kiu daŭros ĝis la fino de aprilo.

## Instruado de Esperanto

Kurso en Benino (de Latifou Gbadamassi). En decembron 2023 la organizaĵo ''Infanoj Ĉirkaŭ Afriko''akiris permeson por enkonduki Esperanton, kiel nedevigan lernobjekton, en ŝtataj mezlernejoj de Benino. Por tiu eksperimento estis elektita la porknabina liceo en Lokossa.
La elektebla kurso de Esperanto por la gestudentoj de scienco kaj tekniko de la Universitato de Zaozhuang, Ĉinio. Uzataj rimedoj: lernolibro de Sun Mingxiao kaj PPT de Anna_Anna Löwenstein. Instruas Alessandra Madella (en la ĉina) kaj asistas Hirundo, la prezidantino de Shandong-a Esperanto Asocio.
La kurson de Esperanto ĉe la universitato en Pekino partoprenis ĉirkaŭ 50 studentoj, venantaj el diversaj fakoj kaj klasoj, inkluzive de la angla, franca, hispana, portugala, rusa, korea, turka, ankaŭ pri komputilo, lingvistiko kaj aliaj. Junaj studentoj en nur 3 horoj majstris la esencojn de prononcado kaj literumo.

## Porafrika agado

La estraro de UEA decidis helpi al Latifou Gbadamassi per duono (250 EUR) de la petita sumo (500 EUR) por kurso de Esperanto por 74 knabinoj, kondiĉe ke li raportu kaj strebu kunlabori kun la samlandanoj. ILEI ankaŭ pagas 250 eŭrojn kaj zorgos pri transportado de 20 lernolibroj en la suahila al Tanzanio.

## Sekcioj

**Bona novaĵo:** ILEI havas nun 39 sekciojn (kompare kun 33 en 2023). Tre aktivaj estas afrikanoj. Ĉiuj novaj sekcioj sendis siajn raportojn. ***La Estraro petas sekciestrojn, kiuj ankoraŭ ne faris tion, sendi iliajn raportojn pri la sekcia agado en 2023!***

**Sukcesa seminario pri esperanto-instruado en Antananarivo, Madagaskaro.**

Laŭ la raporto de Miora Raveloharison : « 32 partoprenintoj partoprenis la seminarion pri Esperanto-instruado 2024.01.04-06 en Antananarivo, Madagaskaro. La seminario havis du kategoriojn de aktivaĵoj: instruistan trejnadon kaj lingvan instruadon. La celo de instruista trejnado estis provizi konojn kaj kapablecon por gvidi kursojn de Esperanto al komencantoj. La celitoj estis kursfinintoj de la 38 bazaj lecionoj laŭ la instruprogramo de UME. La trejnado inkluzivis mallongajn teoriojn pri instruado, seancon de instru-provado sen lernantoj kaj praktikajn kursojn kun veraj komencantoj. En la dua parto ni instruis Esperanton al 25 komencantoj inter 11- kaj 40-jaraĝaj per lernant-partoprenigo, per ludo kaj kanto. Trejnitaj instruistoj praktikis kun la veraj komencantoj. Atestiloj estis disdonitaj al la kvar trejnitoj kaj al gelernintoj, kiuj sukcesis la skriban teston kaj la parolan teston. Inter la efikoj de la seminario estas: la Landa Asocio UME kaj ĝiaj sekcioj agadas denove. Kvar novaj instruantoj pretas labori kaj disvastigos Esperanton. La gelernantoj daŭrigas lernlernadon de Esperanto kaj volas prezenti ĝin al aliauloj. Kaj :unu el religiaj fratinoj, kiuj gastigis la partoprenintojn, komencis lerni Esperanton». Pli detalan raporton eblos legi en IPR.

***La Estraro kore gratulas niajn malagasiajn samideanojn kaj precipe la D-inon Miora RAVELOHARISON kaj deziras pliajn sukcesojn!***

Kunlabore kun Tea, la Esperanto- Asocio Giorgio Canuto de Parmo, Italio, ankau realigis eventon "Teo, amo kaj la Mondo" en salono apud la Ĉina Muzeo en Parmo la 10-an de februaro 2024. La eventon, kiu substrekis Interkulturan Komunikadon, inkluzivis la prezentadon de la Homa Ĉeno de ILEI kaj de la projekto "Vojaĝo al la Oriento" de Maximiliano Garcia, krom la disdonado de malnovaj numeroj de IPR kaj Juna Amiko al la partoprenantoj. Partoprenis pli ol 70 homoj.

**Projektoj**

**Premio La Torre**

Omaĝe al Profesoro Mauro La Torre (1946 – 2010), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la familio La Torre anoncas konkurson pri esplorlaboro en unu el la kampoj, en kiuj li laboris. Profesoro La Torre estis Prezidanto de ILEI (1998 – 2003). En 2011 la Komitato de ILEI elektis lin honora membro de ILEI.

La esplor-kampoj por la konkurso estas:

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj
- Interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluo de la vorttrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidatoj anoncu sian intencon partopreni ĝis la 30a de aprilo 2024. La sinanonco prezentu koncize:

- La kandidaton: plena nomo, institucio, pozicio/posteno, esplorinteresoj, ĝisnunaj esplorspertoj
- La temon: titolo, konciza esplorplano, celoj kaj atendataj rezultoj de la esploro

La Estraro de ILEI kaj la familio La Torre starigos juĝ-komisionon en rilato kun la proponitaj esplortemoj de la kandidatoj. Ĝi sekvos kaj pritaksos la esplorlaborojn, kiuj devos esti dokumentitaj kaj priskribitaj per esplorraporto ampleksa inter 20 kaj 30 A4-paĝoj, ne publikigita nek planita por publikigo aliloke.

Limdatoj

- 2024/04/15: Sinanonco/kandidatiĝo, 1 paĝo
- 2024/06/15: Resumo kaj strukturo de la esplorraporto, 2 paĝoj
- 2024/09/30: Skiza mezperioda esplorraporto, 3-5 paĝoj
- 2024/10/31: Pritakso kaj konsiloj al la kandidatoj
- 2024/12/31: Definitiva esplorraporto, ne publikigita antaŭe nek planata por publikigo ĉe alia eldonisto, 20-30 paĝoj
- 2025/02/28: Anonco pri gajninto
- 2025/03/15: Solena konkludo de la konkurso kun proklamo de la rezultoj (virtuala evento)

Ĉiuj kandidatoj verku siajn sinanoncon, resumon, mezperiodan kaj definitivan esplorraportojn en Esperanto kaj transdonu ilin ĝis la difinita limdato rete al ilei.prezidanto@gmail.com, kaj la prezidanto transdonos ilin al la familio La Torre, al ILEI kaj al la juĝ-komisiono. La gajninto devos sendi naŭ paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo por la familio La Torre kaj diversaj gravaj E-bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI "Ni savu niajn semojn".

La Premio La Torre konsistas el sumo de 700 eŭroj kaj diplomo. La sumo estos ĝirita al UEA-konto de la gajninto, aŭ alia konto indikita de la gajninto. Eventualaj bankkostoj estos subtrahitaj de la premia sumo.

ILEI retenas la rajton aperigi en siaj publikaĵoj la gajnintan esplorraporton .

La konkurso La Torre okazis jam tri fojojn, en 2015, 2018 kaj 2022.

ILEI kuraĝigas ankaŭ studentojn en la fakoj rilataj al la konkurso, precipe magistrajn kaj doktorajn kandidatojn, adapti siajn ne publikigitajn laboraĵojn al postuloj de la konkurso kaj kandidatiĝi por la premio.

**Interŝanĝo de lernantoj**

ESPERANTO-ateliero de la liceo Victor CONSIDERANT de Salins-les-Bains (Francio) subgvide de Emmanuel Desbrières en februaro retkunvenis kun Bengaluro (Barato). Tio estis trejnado por paroli esperanton antaŭ la vojaĝo al Slovenio. La gelernantoj diskutis rekte en Esperanto kun la vic-prezidantino de TEJO Sneshaja VENKATESH, ŝi prezentis, i.a. la agadon de TEJO. La tutan kunvenon partoprenis ankaŭ la lernejestro de la Liceo.

**Universitata agado**

**"Kunpes(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj"**

Universitata retkonsido 2024.02.05 partoprenigis dek du universitatanojn el dek unu landoj: Barato, Brazilo, Britio, Ĉinio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Kostariko, Nederlando kaj Serbio. Partoprenis unu estrarano de UEA kaj tri de ILEI. Katalin Kovàts skizis la programon por ekzamenoj je niveloj B1, B2 kaj C1 junie, ekzamenoj en Aruŝa aŭguste je tiuj niveloj kaj C2 en novembro. Ŝi parolis plie pri la programo de provekzamenoj. Sekvis Xiao-feng GONG (Arko), kiu raportis pri planoj por novaj kursoj en ĉinaj universitatoj. Radojica Petrović el Serbio klarigis la planon de ILEI reproponi la premion La Torre por instigi konkursanojn pretigi universitat-nivelajn disertaciojn. Giridhar Rao el Barato rakontis pri la partopreno en lingva festivalo pri indiĝenaj lingvaj rajtoj.

La Kunpens(ig)ado 2024.03.04 pritraktis sekvajn temojn: Arko raportis pri la komenco de kurso pri Esperanto en la Fremdlingva Universitato en Pekino. Sekvis informo de Philippe Planchon pri la progreso de la simpozio pri konstruitaj lingvoj en Francujo kaj de Ahmad Mamduhi pri la landa kongreso de iranaj esperantistoj en la universitato de Teherano. Ilona Koutny raportis pri lastaj agadoj kaj planoj en Poznan ĉefe rilate al eldonado en la revuo Investigationes Linguisticae kaj al la sekcio pri interlingvistiko en la monda kongreso de lingvistoj.

La Kunpens(ig)ado 2024.04.08 estis iom malgranda laŭ la nombro de la partoprenintoj, sed tre interesa pro la enhavo. Radojica Petrović klarigis la unuajn rezultojn de la enketo inter esperantistoj farita kunlabore kun la fakultato pri filozofio de la universitato en Beogrado. La montritaj rezultoj konfirmis, ke la aĝo, en kiu oni plejmulte eklernas esperanton, varias de 15 al 30 jaroj. Do, oni direktu la informadon al tiu aĝo-grupo! La registraĵojn de ĉiuj sesioj de la Kunpens(ig)ado eblas spekti ĉe la jutuba kanalo de UEA:
https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5.
Estis anonco pri unu nova kurso en la universitato de Stanford en Usono kaj 4 novaj kursoj en la universitato de Teherano [du retaj kaj 2 ĉeestaj]. ***Apartan dankon al la ĉinaj universitatanoj, kiuj sekvas la diskutojn regule!***

**Eldonado**

Omaĝe al 75-jariĝo de ILEI estis decidite eldoni antologion de la plej interesaj materialoj el IPR tra la tuta ĝia ekzisto. Respondecas pri tio la estrarano Fernando Pita. La unua numero de la libro pri la historio de ILEI traktos artikolojn de la komenco de IPR ĝis 1960, antaŭ kiam ĝi fariĝis la organo de ILEI. Tio inkluzivos du mondmilitojn kaj la malvarman militon. Temas pri ĉ. 170 paĝoj, nur de artikoloj originale en Esperanto.

**IPR kaj JA**

La Estraro decidis disponigi la numeron de IPR 2024-1 al ĉiuj membroj de ILEI libere kaj senpage, i.a. por varbaj celoj. Ĝi estis dissendita al la membraro kaj estas libere elŝutebla ankaŭ el la retejo https://www.ilei.info/pdf/Ipr241-print_IUGUZguzggGG.pdf.

Jen la alvoko: "Kara samideano, ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) ĝoje sendas al vi PDF-version de la nova numero de IPR (Internacia Pedagogia Revuo), kiu estas nia oficiala organo kaj regule sendiĝas al ĉiuj membroj de ILEI. Tiu ĉi numero por ĉiuj estas libere elŝutebla ankaŭ el nia retejo (https://www.ilei.info/pdf/Ipr241-print_IUGUZguzggGG.pdf).

IPR prezentas teoriajn kaj praktikajn instru-fakajn artikolojn, edukajn novaĵojn pri lerneja kaj universitata agado, recenzojn de lernolibroj kaj de alispecaj lerno-materialoj, organizajn informojn kaj intervjuojn kun gravaj Esperanto-instruistoj, -verkistoj kaj -artistoj. Ĉi-numere vi povas trovi ankaŭ informojn pri niaj rilatoj kun UNESKO.
Legu la revuon, disvastigu ĝin kaj, se vi ankoraŭ ne estas membro de ILEI, bonvolu tuj aliĝi por la jaro 2024 aŭ ĉe via landa ILEI-sekcio aŭ rekte ĉe nia retejo ilei.info. En la retejo vi trovas ankaŭ ĉiujn informojn pri ILEI kaj ĝia agado".

Marte la Estraro decidis malpligrandigi la kvanton de presitaj revuoj ĝis po 360 por ambaŭ ili pro la kialo, ke multaj abonantoj preferas retajn revuojn.
La Estraro klopodas finsolvi la problemon kun malnovaj revuoj, kiuj restas ĉe Stano Marček. Parton prenos Laura Brazzabeni al Italio, parton – E@I por postaj disdonoj. 60 numerojn de JA sendiĝis marte al Madagaskaro laŭ la peto de la sekciestro Miora RAVELOHARISON pere de la germana samideano. ILEI pagis sendokoston de tiuj ekzempleroj al Germanio el Afrika fonduso**.**
ILEI pripagos ankaŭ sendadon de 20 ekzempleroj de IPR por varbaj celoj rilate al UNESKO.

**Kunlaboro kun enmovadaj institucioj**

**Kun UEA**

**Internacia Esperanto-kongreso**

Ekde la 17-a ĝis la 24-a de aŭgusto 2024 okazos Internacia Esperanto-kongreso, kie kunvenos blindaj esperantistoj, serbaj esperantistoj, balkanaj esperantistoj kaj okazos Seminario pri InterKultura Kompetento de SEL/UEA: Trejnseminario pri interkultura komunika kompetento, instrukapabligo kaj aktivula lertigo kun ebleco ricevi stipendion por partopreni:
- La 88-a IKBE (Intrernacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj);
- Tagoj de ILEI: regiona renkontiĝo de instruistoj kaj ILEI-anoj de balkanaj kaj danubaj landoj;
- Balkanaj tagoj: kunveno de esperantistoj el balkanaj kaj najbaraj landoj.

Loko: Zemun (Beogrado), en "Lernejo por vid-difektitaj gelernantoj Veljko Ramadanoviĉ", Cara Duŝana 143, 11080 Zemun - Beograd. La Lernejo estis dum jardekoj dissemanto de Esperanto. Nemalproksime de la flughaveno kaj la fervoja kaj aŭtobusa stacidomoj.

Loĝado: Ni loĝos kaj manĝos en la sama domo, kaj en la sama korto troviĝas konstruaĵo en kiu estas du konferencsalonoj, ekipitaj per modernaj teknikaĵoj. Ĉie ekzistas retkonekto.

Kotizo: Partoprenkotizo kiu inkluzivas loĝadon, tri manĝojn tage, partoprenon en la programo kaj ekskurson estas 270 eŭroj. Aliĝkotizo por tiuj kiuj loĝos aliloke estos 50 eŭroj.

Aliĝo: Bonvolu deklari vian intencon partopreni per mesaĝo al: <nedeljkalozajic ĉe gmail.com> aŭ <zarkovicjovan ĉe gmail.com>.

Samtempe okazos en Beogrado la Esperanto-Semajno, la 17-24-an de aŭgusto 2024.

**Kun SEL (Serbia Esperanto-Ligo)**

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kaj ILEI-RS okazigis enketadon inter esperantistoj cele helpi al ilia esploro, kiun ili realigis kunlabore kun neesperantista fakulino, profesorino de la Filozofia Fakultato de Universitato en Beograd, kiu kunmetis serblingvan enketilon kun kvardeko da demandoj. Radojica Petroviĉ kun helpo de Aranka Laslo esperantigis la enketilon kaj diskonigis ĝin tra la tuta Esperantujo. La serblingvan demandaron respondis 65 enketitoj el Serbio kaj kvin aliaj landoj, kaj la Esperantan 271 el ĉiuj kontinentoj. Pliaj informoj aperos en IPR 2024/2 kun parteto de la unuaj esplorrezultoj. Plena esplorraporto aperos kiam ĝi estos preta.

Temis pri enkonduka enketo por bildigi la strukturon (aĝan, profesian, edukan, patrinlingvan) kaj fizionomion de la Esperanta parolkomunumo. SEL esperas, ke tio donos direktilojn por nova enketo, planata por neesperantista publiko en Serbio cele al kreado de pli efikaj agadstrategioj eksteresperantuje -- kiel varbi pli da kursanoj kaj kiel plivastigi la uzadon de Esperanto.

**Kun Tianjina Esperanto-Asocio (TEA)**

Danke al la grupo de Tianjin, la animacio de la grupo de Parmo "La Aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo" havas ekde nun la okajn subtitolojn, en la ĉina.

**Kun Itala Esperanto-Federacio**

La 20-an de februaro 2024 Itala Esperanto-Federacio okazigis la Zoom-eventon kun la temo "Ĉu vi ŝatas kongresumi?" Temis pri kelkaj internaciaj kunvenoj en diversaj partoj de la mondo, kiujn prezentis iliaj organizantoj kaj respondeculoj:

- 90-a Itala Kongreso en Montecatini Terme (Italio) 24-a / 31-a aŭgusto 2024
- 47-a IJF en Serrada di Folgaria (Italio) 27-a marto -/2-a aprilo 2024
- Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo (Francio) 8-a / 12-a majo 2024
- 109-a UK en Aruŝo (Tanzanio) 3-a / 10-a aŭgusto 2024
- 80-a IJK de TEJO en Šventoji (Litovio) 18-a / 25-a aŭgusto 2024
- **57-a ILEI-kongreso en Maceio (Brazilo) 20- a / 27-a julio 2024.**

**Kun Japana Esperanto-Instituto**

La junuloj de Japana Esperanto-Instituto jam realigis en sia jutuba kanalo "Esperanta Ponto" ludliston kun siaj videoj en la kanalo de ILEI. Do, ILEI reciprokas kreante en nia kanalo ludliston por ilia kanalo (Esperanta Ponto), kiu enhavos la du videojn iliajn jam en nia kanalo (vizitojn de Asakusa kaj al la vegana restoracio Sojo) krom speciale farotan enkondukan videon de ilia tuta kanalo. La videojn faris/faros Nakajima Miki, profesia reĝisorino de NHK.

**Kun Ĉina Radio Internacia (ĈRI)**

Februare aperis artikolo de Alessandra Madella por Ĉina Komunikila Grupo pri la interkultura evento "Teo, Amo kaj la Mondo" en Parmo, Italio. Eventoj de "Teo, Amo kaj la Mondo", lanĉita de la Esperanto-Asocio de Tianjin, jam okazis en pluraj landoj, inkluzive de Uzbekio kaj Orienta Europo. Kaj estis la unuan fojon en Italio:
https://esperanto.cri.cn/2024/02/23/ARTIHdvcx2rvAaf04eqxlj0S240223.shtml
Alia utila evento - video-kurso, kiu malfermos por vi la buntan mondon de Ĉina teo. Per tiu projekto vi povos lerni pri teo pere de Esperanto kaj pri kiel uzi Esperanton praktike en specifa kunteksto. Legu pli ĉe: https://www.ilei.info
La 2-a parto: Teo, amo kaj la mondo en Parmo 2024: Dua parto
La 3-a parto: https://www.youtube.com/watch?v=ail9JgqoWaM
Prezento de la projekto "Lernu pri la Mondo de Teo per Esperanto" de MA-Ga Filmoj kaj la interncia agado "Cxu vi trinkis teon hodiau" de Tianjin-a Esperanto-Asocio:
https://www.youtube.com/watch?v=a1qGyBQ3NfM&t=71s
Aliaj materialoj, publikigitaj kune kun ĉinaj samideanoj:
https://esperanto.cri.cn/2024/02/02/ARTIryZlx5obWRagXsjlwyS5240131.shtml
https://esperanto.cri.cn/2024/02/07/ARTI4zLjCCVXT3e60hZtoijc240207.shtml
Kaj video: https://www.youtube.com/watch?v=ysfEwu4ByDc
Artikoleto por Ĉina Komunikila Grupo pri drakoj kaj serpentoj en helenaj kaj romiaj tempoj:
https://esperanto.cri.cn/2024/01/19/ARTITbSNs6l1DnlKd0vJfoJB240119.shtml

**Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj**

**Kun UNESKO**
Por la sekvonta agado ĉe UNESKO Didier Janot preparis novan mallongan informilon pri ILEI kaj Esperanto: unuflankan reklamilon kun mallonga grava informo cele al tuja kapto de atento kaj instigo serĉi pli detale (ekzemple, viziti retejon). La ĉefa ideo estas montri, ke Esperanto ekzistas kiel lingvo kaj ke ekzistas Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu aktivas.

**Kun FIPLV**
Por la la venonta numero de la bulteno de FIPLV, Alessandra Madella verkis la artikolon pri Esperanto-agado en Zaozhuang-Universitato (pri solena festo okaze de la 10-a jubileo de la Esperanto-Muzeo).

**Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI: Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI: Ahmad Reza Mamduhi

2024-04-15